Universala Esperanto-Asocio

LANDA KAJ LOKA AGADO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2018-05 sendita el Budapeŝto, la 16an de marto.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# Nova landa asocio fondita – Uzbekio reaktivigas sin

Estas ĵus fondita la Uzbekia E-Asocio (UzEA). La ĉefaj fondintoj estas kvar personoj kaj la membroj entute estas 12 personoj, ĉefe en Taŝkento kaj Samarkando. Rakontas la nova prezidanto, s-ro Gafur Mirzabayev, (karesnome Mirzo): “La Asocio ankoraŭ ne estas oficiale registrita -- ni jam preparis ĉiujn dokumentojn kaj baldaŭ ni registriĝos oficiale. Fizikan adreson ni ankoraŭ ne havas, sed nun ni serĉas taŭgan ejon.

Retadreso intertempa: gafur-mirza56@mail.ru; telefonnumero: 998 94 686 04 56. Certe bonvenas gratulmesaĝoj kaj konkretaj helpproponoj.

Kontribuis al la renaskiĝo la rusa Tatjana Loskutova, kiu senlace agadas multlande. Aldone al la prezidanto, la tri pliaj estraranoj estas la ceteraj kunfondintoj:

Umid Mirzabayev (nask. 1981) - vic. prezidanto.
Aziz Rixsiyev (nask. 1985) - vic. prezidanto.
Bexzod Xamidxodjayev (nask. 1983) - ĝenerala sekretario.

Al nia demando ‘Kio estas urĝe bezonata por fortigi vian asocion?’ Mirzo respondis: “La urĝa afero estas la registriĝo. Por tio ni devas havi propran oficejon por ke ni indiku nian juran adreson. Laŭ nia ŝtata leĝo oni ne rajtas indiki adreson de propra apartamento por fondi neŝtatan, nekomercan organizaĵon. Post la leĝa registriĝo ni rajtos publike kaj vaste propagandi E-on, fondi klubojn kaj sekciojn en ĉiuj regionoj kaj instrui kaj aranĝi diversajn Internaciajn aranĝojn ktp.”

## Subtenu renoman urbon per via saluto

LA INTERNACIAJ LETERTAGOJ :’SALUTON, NAŬRUZO!”. EN 2750-JARA SAMARKANDO, “KORO DE LA GRANDA SILKA VOJO”, URBO DE MONDA HEREDAĴO DE UNESKO

La 21-an de marto, venos Naŭruzo, la orienta Novjaro, ŝatata festo en Uzbekio kaj pluraj aliaj landoj. Naŭruzo (signifanta 'Nova tago') estas popola simbolo de vekiĝanta naturo, printempo, bono, paco kaj nova vivo. La Naŭruz-festo estas enskribita en la Reprezenta Listo de Nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro.

Bonvolu sendi viajn gratulleterojn, eventualajn pensojn aŭ sentojn pri la Naŭruz-sezono, al nia retadreso: imps86@yahoo.com. Ĉiu ricevita mesaĝo estos danke agnoskita kaj la raporto pri la evento estos sendita al ĉiuj partoprenantoj. La plej interesaj kontribuaĵoj aperos en nialanda gazetaro.

Anatoli Ionesov, kunordiganto de la projekto kaj la sola delegito de UEA en Uzbekio,:
Klubo de Interpopola Amikeco "Esperanto", P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkando.

# Eŭropa Bulteno

La nova numero: http://www.europo.eu/eo/documentloader.php?id=475&filename=eb-178-2018-02.pdf

# La virina tago en Hiroŝimo



Ĉi jare ni festis la Virinan Tagon en Hirosima sub la temo "Plenplenan subtenon al Pakto por malpermeso de Nukleaj Armiloj!". Ni petis subtenan mesaĝon de la 13 parlamentanoj el la gubernio Hiroŝimo kaj 47 ambasadoroj en Japanio kiuj subskribis la Pakton. Tri parlamentanoj de opoziciaj partioj kaj 12 ambasadoroj respondis al ni. Ni jam ekspozicias iliajn mesaĝojn.

# Intensa programo de ekzamensesioj

La ekzamena komisiono de UEA, kaj aparte energie Katalin Kovats en tiu komisiono, starigis impresan liston de ekzamenoj tra la mondo por ĉi tiu jaro.Ĝi havas 25 enskribojn, el kiuj 16 okazos en la Tutmonda Ekzamentago, ĉi-jare en la 16a de junio. Rigardu la liston ĉi tie: https://edukado.net/ekzamenoj/ker/aktuale .

Multaj homoj loĝas apud unu el tiuj ekzamenaj lokoj. Kuniĝu kun la aliaj kuraĝuloj kaj aliĝu al tiuj ekzamenoj. Vi povas fari tion ĉe la paĝo:

https://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj

# Esperanto.net en plia mondlingvo

Danke al la laboro de Emilio Cid, estrarano pri informado de UEA, kaj al la laboro de juna siria esperantisto, Taled Orabi, ni, la komisiono de UEA pri agado en la landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko (MONA) , disponas pri la arablingva versio de la paĝaro www.esperanto.net: http://esperanto.net/ar/

Vi povas kompreni la grandan antaŭensalton rilate al nia kutima paĝareto.

Renato Corsetti

## Sukcesa kurso en Tel Aviv

Multaj opinias ke jam pasis la epoko de klasaj kursoj, La israela Landa Asocio ELI tion spertis per multjara malpliiĝo de la lernantoj en ĝiaj E-kursoj. Lastatempe ELI decidis reprovi klasan kurson kaj investi senprecedencan buĝeton por reklami la kurson kaj informadis, per strat-afiŝoj, *Facebook*,kaj duonpaĝa anonco en la gazeto *Haarec*.



Dum la kursa inaŭguro en la Tel-Aviva klubo, alvenis 36 personoj. La sperta instruisto, Doron Modan, estis surprizita kaj ekcitita pro tiu ne atendite granda nombro. La unua leciono okazis en bona kaj trankvila etoso, kaj la lernantoj progresis rapide kaj interesiĝis pri la sekvo. Entute okazos 15 lecionoj ĝis julio.

Amri Wandel.

Sume: 685 vortoj

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj, klingonoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.